



La Voĉo de Amikejo

Informilo pri *Senlime* kaj Esperanto en Eŭregiono Mozo-Rejno

Sendita al :

Senlime

Esperanto-Asocio en Eŭregiono Mozo-Rejno
Avec le soutien de la Communauté française

En cas de non-distribution, renvoyer à

H. Lentzen
Feldweg 20
BE-4701 KETTENIS
Tel. xx-32-(0)87-55.43.26
E-mail : lentzen@senlime.org**Editeur responsable****Responso eldonanto +****Informoj en la franca lingvo:**

Tel. +32-(0)87/33.02.92

GSM +32-486-947.957

Mail: jacques@senlime.orgJ.-M. Jacques, 5 rue J. Wauters
Esperantista Grupo de Verviers
BE-4800 VERVIERS**Informatie in het Nederlands****Informoj en la nederlanda:**

Tel. xx-31-(0)43-455.14.36

Mail: parren@senlime.orgP.H.H. Parren, Heimansstr. 16
NL-6285 AM EPEN**Informationen auf deutsch****Informoj en la germana:**

Tel. xx-49-2406-7809

Mail: hogen@senlime.orgK. Hogen, Schütz-v-Rode-Str. 43
DE-52134 HERZOGENRATH**Aperas kvarfoje en jaro kaj****rete elŝuteblas ĉe**www.senlime.org**Prezroj por BE, NL kaj DE :****Unuopa n-ro : 4 EUR****Jara abono : 12 EUR**Bonvolu pagi, prefere decembre aŭ
januare, **NUR** al la konto :**979-5327148-10**

IBAN : BE41 9795 3271 4810

BIC : ARSPBE22

(banque : Argenta)

de *Senlime*, 25 rue Pierre Fluche,
4800 VERVIERS, Belgio.La kotizo (10 € - denove deviga)
estas disigita de la abono al la
papera versio de nia informilo (12€).

Senlime invitas vin al

“renovigita” Zamenhof-festo

la 20an de decembro je la 11h45

en « *Le Coin des Saveurs* », 28 av. de Spa, 4800 VERVIERS (BE)<http://www.coindessaveurs.be/>Loko pli facile atingebla ol Kelmis (piede, 15 min for de la stacidomo),
kun aŭtobus-haltejoj kaj multaj parklokoj por aŭtomobiloj apude.

Aŭtobus-horaroj (pl. Vieuxtemps kaj policejo piede foras nur 2 min) :

Aŭtobus-linio n-ro	703	706	703	706
en la direkto al	Jehanster	Heusy	Jehanster	Heusy
Centra stacidomo	10h43	11h15	11h53	12h08
Placo Vieuxtemps	-	11h23	-	12h16
Policejo	10h52	-	12h02	-

Menuo :

Sezonaj enbuŝigaĵoj

A. Bova tataro tranĉita, hepataĵo
kaj ĝia figa ĵeleo kaj brioĉo kun butero**aŭ**B. Kuirpapero kraba, St-Jacques kaj gambaoj
la tuto en omara buljono

Sezona intermanĝaĵo

C. Numido dolĉe kuirita, suko je salvio, polenta fritbulo,
krusto je cepoj, krema florbrasiko**aŭ**D. Morua dorso en petrosela krusto sur kukurbetoj fanditaj
terpomoj « dukinaj » je sekigitaj tomatoj, suko je mustardo

Deserta telero kun la tri plej belaj sezonaj preparaĵoj.

Kultura programo kiel kutime (vidu p. 2).**Deviga antaŭpago** je la konto de *Senlime* (vidu maldekstre) :30 EUR (*trinkaĵoj ne enkalkulitaj*). **Limdato : 6an de decembro.****Menciu sur la pagilo via(j)n nomo(j)n kaj (po unu) elekton :****AC - AD - BC aŭ BD.****Koran dankon kaj bonan alvenon !**



Niaj programeroj lupee

detaloj pri anoncitaj prelegoj, vesperoj, festoj,...

Per "Google Earth", ni vizitos vin hejme !

Google Earth estas programaro kiu montras la teron en 3 dimensioj per satelitaj bildoj. La programaro estis kreita de **Keyhole, Inc.** kaj aĉetita de **Google** en 2004.

Tri versioj ekzistas: senpaga versio, Google Earth **Plus** (\$20 /jaro) kun aldonaj aferoj, kaj Google Earth **Pro** (\$400/jaro) por komercaj uzoj.

Pluraj grandaj urboj povas esti sufiĉe detale observataj por individue distingi ĉiun konstruaĵon, domon, veturilon, eĉ piediranton... Kelkloke oni eĉ distingas detaletojn kiel kafo-tasoj en ĝardeno, koloro de la ĉemizo de ĉeestanto, k.t.p.

Didier Lousberg, kiu, dum alia prelego, jam montris al ni kelkajn famajn vidindaĵojn sur Google, ĉi-foje malkaŝos al ni ĉiuj la aspekton de niaj individuaj domoj, ĝardenoj, stratoj, kvartaloj...

Ne tro timu, ĝis nun la bildoj ne montras la «nunan momenton» : neniu do rimarkos ĉu vi ĉeestas aŭ ne kaj kion precize vi faras...

Sed certe iam eblos !

Pliaj informoj :

<http://earth.google.com>

10-16 19h30 BE-Kelmis, Sélect: "Google Earth : ni vizitos vin hejme" (far' Didier Lousberg).

Sabloskulptaĵoj ĉe la belga marbordo

Kiu, knab(in)o, ne konstruis konusan kasteleton el sablo sur unu el la plaĝoj de la belga marbordo ?

Kiom alta ? Malofte pli ol du metroj da alto ! Kial ? Pro la formo de la eroj de tiu marborda sablo. Ĝi ja ne taŭgas por konstrui fantaziaĵojn de 5-6 metroj da alto.

Tial necesas alporti tunojn da sablo havanta angulajn erojn. Tiuj krudaj materialoj estas malsek-igotaj, premotaj, skulptotaj.

Malgraŭ la vento kaj la pluvo, la nedaŭraj verkoj, faritaj de fakistoj devenaj de pluraj landoj, konservas sian fortikecon dum du monatoj.

Tiel, la 20an de novembro, R. Demarche elektis centon da lumbildoj fotitaj ĉu en Zeebrugge ĉu en Blankenberge.

La kvar temoj estos :

Romanio (en 1999) ;
La nigrhaŭta Afriko (en 2000);
La dinosaŭroj (en 2001) ;
Sudameriko (en 2003).

Arta, impona, mirinda !

11-20 19h30 BE-Kelmis, Sélect : "Sablo-skulptaĵoj ĉe la belga marbordo", prelego de Raymond Demarche, kun lumbildoj.

Zamenhof-festo

Kiel multaj aliaj esperantistaj grupoj, ni ĉiujare festas la datrevenon de naskiĝo de Zamenhof, tio estas la 15a de decembro (fakte, alian daton ni preferas elekti, tiel evitante koincidon).

Sed multaj forgesas, ke tiu tago estas elektita kiel tago de literaturo kaj libro en esperanto.

Senlime krome klopodas iomete plilarĝigi la temojn de siaj kulturaj eroj al ludo, radio, televido, muziko, kino, teatro, k.t.p. (en esperanto aŭ rilate al esperanto, kompreneble).

Senlime ankaŭ volas regule remomorigi al la esperantistaro kaj al la neesperantistoj pri la ununura historia klopodado krei esperantistan ŝtaton en la iama Neŭtral-Moresnet (Amikejo), kio ĉiam donas specialan etoson al siaj festoj.

Parte tial, dum pluraj jaroj, nia Zamenhof-festo okazis en Kelmis, iama Amikejo. Sed **Senlime** laŭdifine ne konas limojn kaj pretas festi ekz-e en Maastrichto, Akeno, Lieĝo aŭ... kiu scias ?

Ĉar ĉi-jare la Verviersanoj konsistigas la plej grandan subgrupon ene de **Senlime**, jen la nova rendevuo :

12-20 11h45 BE-Verviers, "Le Coin des saveurs", Zamenhof-festo de **Senlime**.

ESPERANTO

Eŭregiona kalendaro 2009 (1/2)



Senlime publikigas, por siaj membroj, agendon pri la esperanto-aranĝoj en la Eŭregiono Mozo-Rejno. Ĝi aperas rete kaj papere.

« Trilandaj renkontiĝoj » estas organizitaj de kiu ajn esperantisto aŭ esperanto-grupo en Eŭregiono Mozo-Rejno interkonsente kun la komitato de **Senlime**. Principe ili okazu dufoje en jaro (printempe kaj aŭtune), laŭvice en ĉiu el la tri landoj (BE, DE, NL).

Tiu-ĉi agendo eventuale povas enhavi programerojn de lokaj grupoj aŭ aktivaĵojn organizitajn aŭ subtenitajn de komitatanoj. Ĝi neniel iĝu kompleta kalendaro de esperanto-aranĝoj (aliaj ekzistas).

La Kelmis-aj kunvenoj de la grupoj de **Senlime** nun regule okazas ĉiun trian vendredon de monato en kulturcentro "Select", Lutlicherstr. 264.

Por kiu ajn propono pri kunlaboro, ĉiam ege bonvena kaj atendata, bonvolu kontakti, prefere rete kaj kiel eble plej frue, la responsulon pri la kalendaro: Jean-Marie **Jacques** (jacques@senlime.org).

Pro la ferioj kaj internaciaj kongresoj, ni ne kunvenos en julio kaj aŭgusto.



09-18 19h30 BE-Kelmis,
Sélect: "**Kio estas energio?**"
(prelego de José **Jacob**).

10-16 19h30 BE-Kelmis,
Sélect: "**Google Earth : ni vizitos vin hejme**" (far' Didier **Lousberg**).

Inf. lousberg@senlime.org

11-20 19h30 BE-Kelmis,
Sélect : "**Sablo-skulptaĵoj ĉe la belga marbordo**", prelego de Raymond **Demarche**.

12-20 11h45 BE-Verviers,
"Le Coin des saveurs":
Zamenhof-festo de Senlime
(*Amikejo* provizore translok-
iĝas !).

<http://www.coindessaveurs.be/>



Pliaj kunvenoj en BE-Kelmis, Select, okazos la: **01-15, 02-19, 03-19, 04-16, 05-21** kaj **06-18** (karaoke).

En raison des vacances et congrès internationaux, nous ne nous réunirons pas en juillet-août.



18-09 19h30 BE-Kelmis,
Sélect: "**Qu'est-ce que l'énergie ?**" (conférence de José **Jacob**).

16-10 19h30 BE-Kelmis,
Sélect: "**Google Earth : nous vous rendrons visite à la maison**" (Didier **Lousberg**).

Inf. lousberg@senlime.org

20-11 19h30 BE-Kelmis,
Sélect : "**Sculptures de sable à la côte belge**" (conférence de Raymond **Demarche**).

20-12 11h45 BE-Verviers,
"Le Coin des saveurs":
Zamenhof-festo de Senlime
(*Amikejo* déménagement provisoirement !).

<http://www.coindessaveurs.be/>



Réunions suivantes au Sélect, La Calamine (BE), les: **15-01, 19-02, 19-03, 16-04, 21-05** et **18-06** (karaoke).

Novaĵoj pri **AMIKEJ** kaj **EMRo**.

(el la ret-informilo de la Yahoo-Grupo «*Amikejo*»)

* "Alternativa" muzik-festivalo en Euxregiono Mozo-Rejno: *La Semo*

"La Semo" (titolo intence elektita en Esperanto), pli ol festivalo, estas koncepto : la ideo ke "dauhra disvolvo" (de nelonge tre laŭmoda esprimo) povas esti asociigita kun festo. Post kelkaj tagoj da koncertado, festivalejo ofte estas nur amaso da rubajhoj.

Post unua sukcesplena provo en 2008, La Semo denove aventurighis de la 11an kaj 12an de julio en Hotton (en la Belga sudo de Eùregiono Mozo-Rejno).

Enprogramigitaj kompreneble estas grupoj favoraj al dauhra disvolvo: La Ogroj de Barbak, Zita Swoon, La strato Ketanu, Staranta sur la Zinko, Suarez kaj multaj aliaj. Nova scenejo tre konscia pri la neceso enrolighi.

Kun 10000 personoj atenditaj en Hotton, la pasintjare jhetita semo sufiche bone elkreskas... kaj denove menciatas esperanto (interalie che RTBF)!



N-B : pro teknikaj kialoj, *esperanto-supersignoj* intence **NE** estas uzataj en nia ret-informilo.

* Telefilmo pri mikronacioj kaj mikroshtatoj

Post germana, nederlanda, flandra kaj ech itala televidteamo, Senlime akceptis en Kelmis (Select, la 18an de junio 2009) valonan televidteamon de RTBF (Radio-Televido Belgia Franclingva) kiu preparas telefilmon pri mikronacioj kaj mikroshtatoj kiel Vatikano, San-Marino, Talossa au... Amikejo!

Nia chefa interparolanto estis neniŭ alia ol Filipino Dutilleul, unu el la realigintoj de fama elsendaro "Strip Tease" por kiu li signis kvardekon da dokumentoj, inter kiuj kelkaj estas premiigitaj. Aparte memorinda estas "Delegacio tre altnivela" [Une délégation de très haut niveau], kiu rakontas dum 52 minutoj achan viziton de diversaj politikistoj belgiaj en Norda Koreo. Pro tro malprotestema kaj ech entuziasma reago al la reghimo de Kim Jong-Il, la prezidanto de la delegacio (Willy Burgeon), skabeno de la urbo Binche, poste estos demisiigita.

Filipo Dutilleul ankaŭ realigis serion da dokumentaj filmoj pri klimataj shanghoj kaj kunlaboris al la elsendo "Chiochi ne redonos Kongon al ni" [Tout ça ne nous rendra pas le Congo] kiu postsekvis la iaman "Strip-tease".

Tiukadre, li konceptis la faman elsendon de "La Unua" la 13an de decembro 2006, fikcio (surprize, okaze de falsa televidita gazeto) sursceniiganta la disdividon de Belgujo laŭ lingva limo. Li indikas ke lia celo chefe estis ekigi debaton kaj "skui" la homojn. Trafe en la cel'!

Nun li volas realigi filmon por granda publiko, elsendeblan je la 20a horo, tuj post la televidita gazeto. Li sin deklaras neutrala (nek por, nek kontraŭ) rilate al esperanto, sed sin montris relative bone informita kaj opinias ke la koincido de esperanto-Amikejo kaj neutral-Moresnet estas substrekenda. Tial li volas enshovi sekvencon pri esperanto en sia verko kaj do volas esti informita pri filmigeblaj esperanto-aranghoj en la iama Amikejo.



* Plia televido en Kelmis...

Teamo de VTM (Flandra Televido-Societo) sendita de Olivier ELEN vizitis Kelmis-on, lundon 20an de aprilo. Ili filmis interalie en la loka muzeo kaj en la trinkejo "Alt Kelmis" (datighanta de la Amikejo-epoko)... kie ili "hazarde" renkontighis kun kvar membroj de Senlime. Inter chi-lastaj kompreneble trovighis nia loka historiisto M. Schrymecker...

VERVIERSA BARKAROL

esperanto-adapto de *Senlime*

Se vi jam vizitis Vervierson, vi certe rimarkis kariljonojn kiu senlace ripetas saman melodion... Se ne, vidu nian ttt-ejon kaj tuj alvenu ĉe ni !

La «Barcarolle Verviétoise» de Corneille Gomzé, datiĝanta el la 19a jarcento, apartenas al la (valona) folkloro Verviersa.

Se vi volas kanti tiun kanzonon kun ni en esperanto, venu dum nia karaoke-vespero aŭ dum nia Zamenhof-festo (Jean-Marie Jacques estas kreinta «krudecan» version de la melodio dank'al sia sintezilo).

En nia n-ro 2009-1, ni alvokis vin al kunlaboro por traduki ĝin en esperanton. Hodiaŭ estas farite kaj jen la rezulto. Dankon.

Kompreneble ne temas nur pri traduko sed pri vera adapto ĉar la originala kanto jam maljuniĝis kaj ne celis esperantistojn. Oni do forigis unu troan strofon, modifetis aliajn (interalie aldonante mencion pri Amikejo...) kaj kompanse antaŭvidis ripozigan silenton (instrumentan strofon) meze de la kanto.

Tiel aranĝita, tiu kanto ŝajne taŭgas por komuna kantado ĉe esperanto-festoj kaj eĉ povus, se utile, fariĝi la «oficiala himno» de la esperantista grupo de Verviers (sed ĉu vere necesas ?).

Verviersa barkarolo

- verkis Corneille **GOMZE**
- esperantigis **Senlime**

+ **INSTRUMENTA** rekantaĵo
(*enkonduke*)

Laŭ ar/i' de ni kant/at/a
dum la manĝ/o ĉi/u/tag/a,
Ni prov/is, am/i/ko bon/a,
re/kant/aĵ/on al/met/i:

Ho ki/el fier/as mi,
se ek/ster/land/as mi,
ke min lul/is pan/jo
en Ver/vi-/aĉ/aĵ/ej/o.

Nen/i/on en la kap/et/oj
hav/as ni, krom la "plok/et/oj",
sed el fel/oj de ŝaf/et/oj
kion ajn fa/brik/as ni!

Ho ki/el fier/as mi,
se ek/ster/land/as mi,
ke min lul/is pan/jo
en Ver/vi-/aĉ/aĵ/ej/o.

Mal/graŭ bru/oj de l'fa/brik/o,
kas/tel/o de l'me/ka/nik/o,
Aŭs/kult/u! Jen bel' muzik/o!
Nun Vi/temp' lud/as por ni!

Ho ki/el fier/as mi,
se ek/ster/land/as mi,
ke min lul/is pan/jo
en Ver/vi-/aĉ/aĵ/ej/o.

Ni la kap/on rajt/as lev/i:
li/ber/ec/on ĉas/is il/i...
Ant/aŭ la mar/tir/o Ŝa/pui,
sur la plac', ge/nu-iĝ/u ni!

Ho ki/el fier/as mi,
se ek/ster/land/as mi,
ke min lul/is pan/jo
en Ver/vi-/aĉ/aĵ/ej/o.

+ **INSTRUMENTA** strofo
(*ripoze*)

Ho ki/el fier/as mi,
se ek/ster/land/as mi,
ke min lul/is pan/jo
en Ver/vi-/aĉ/aĵ/ej/o.

Ni mal/aŭd/u klaĉ/em/ul/ojn,
ti/ujn aĉ/ajn men/sog/ul/ojn,
pri la flag' de l'plur/lingv/ul/oj:
ja tre bon/e taŭg/as ĝi!

Ho ki/el fier/as mi,
se ek/ster/land/as mi,
ke min lul/is pan/jo
en Ver/vi-/aĉ/aĵ/ej/o.

Nun prok/sim/e, Am/ik/ej/o
por ni iĝ/is kun/ven/ej/o,
de "Sen/lim/e" la prov/ej/o:
es/per/ant/on fleg/u ni!

Ho ki/el fier/as mi,
se ek/ster/land/as mi,
ke min lul/is pan/jo
en Ver/vi-/aĉ/aĵ/ej/o.



La «Verviersa barkarolo» kompreneble haveblas ĉe **Senlime** sub la komputila formo de karaoke-dosiero.

<p>Verviersa Angulo Verviersa Espersanto Grupa</p>	<h1 style="text-align: center;">Paul Harris</h1> <h2 style="text-align: center;">pionnier d'un nouveau monde</h2>	
<p>Comité de V.E.G.: Président: J. Jacob 19 Chemin de la Rostibouhaye 4910 POLLEUR (THEUX) Tél. 087/22.10.79</p> <p>Trésorier: D. Lousberg 25 Rue Pierre Fluche 4800 VERVIERS Tél. 087/ 087/222030</p> <p>Secrétaire: J.M. Jacques 5 Rue Joseph Wauters 4800 VERVIERS Tél. 087/33.02.92</p> <p>V.E.G. dépend de l' Association pour l'Espéranto (A.P.E.) M. Delforge 16 Rue des Glacières 6001 MARCINELLE</p>	<p>Ludovic Zamenhof et Paul Harris partageaient le même idéal : améliorer les relations humaines. Pour y arriver le premier a composé une langue internationale afin de permettre une communication équitable et le second a favorisé les actions humanitaires. La parole et l'action sont les deux piliers du progrès.</p> <p>La vie de Paul Harris a été racontée en en bande dessinée par Laurent Dareau (R.C. Wilshire, Los Angeles) sur l'initiative de Michel Dareau (R.C. Riom/Châtel-Guyon).</p> <p>Il s'agit d'une B.D. de présentation traditionnelle dans le but de mieux faire connaître le mouvement rotarien non seulement aux rotariens mais aussi aux autres.</p> <p>La vente du livre se fait au profit exclusif du fonds destiné à éradiquer la poliomyélite dans le monde.</p> <p>L'amicale rotarienne RADE (Rotaria Amikaro De Esperanto) réunit des rotariens espérantophones de langues et de cultures différentes depuis 1928.</p> <p>Comme toutes les institutions internationales, le Rotary International connaît des problèmes de langue et l'amicale RADE désire promouvoir l'utilisation de l'esperanto.</p> <p>Cette amicale a traduit la BD en esperanto et grâce au soutien financier du Rotary Club de Spa-Francorchamps-Stavelot elle a pu imprimer une édition numérotée et limitée à 250 exemplaires.</p>	<p>La bande dessinée est vendue à 20 € uniquement au profit de l'éradication de la poliomyélite dans le monde.</p> <p>Le livre a été présenté au président international du Rotary, D.K. Lee, à Birmingham lors de la Convention Internationale du Rotary en juillet 2009.</p> <p>Nous espérons par cette édition mieux faire connaître le Rotary aux espérantophones et promouvoir l'esperanto au sein du Rotary.</p> <p style="text-align: right;">Joseph van der Vleugel</p> <p style="text-align: center;">-----</p> <p>Le livre (79 pages 21 x 29,50 cm) peut être commandé au :</p> <p>Rotary Club Spa-Francorchamps-Stavelot c/o Joseph Van der Vleugel 3, avenue Monbijou BE-4960 Malmedy , Belgio</p> <p>Prix : 20 € + frais d'envoi*, à verser au compte IBAN : BE60 2480 4230 7870 BIC : GEBABEBB de : Rotary Club Spa-Francorchamps-Stavelot</p> <p>En mentionnant : "Paul Harris"</p> <p>* frais d'envoi : - Belgique : 7,10 € - Europe / USA : 11 € - autres pays : 17,40 €</p> <p>Attention : le tirage a été limité à 250 exemplaires, et chaque exemplaire a son propre numéro.</p>
<p style="text-align: center;">Cotisations</p> <p>Les espérantistes et sympathisants sont cordialement invités à soutenir notre programme d'action en versant dès aujourd'hui l'une des cotisations suivantes au compte n°: 000-0245571-64 IBAN: BE29 0000 2455 7164 BIC: BPOTBEB1 (Banque de la Poste) de: Esperanto grupo 25 Rue Pierre Fluche BE4800 VERVIERS</p> <p><i>La cotisation de Senlime est de nouveau obligatoire et fixée à 10 EUR (l'abonnement à ce bulletin en version «papier» s'élève à 12 € en raison de l'augmentation des coûts).</i></p> <p style="text-align: center;">D'avance, merci à tous !</p> <p>A.P.E. 2009 (EGV) 14 € U.E.A. 2010 (MA) 60 € Senlime (cotisation 2010) 10 €</p> <p>en indiquant le nom du membre cotisant, le bénéficiaire, l'année «cotisation de pour».</p>		